

zentas arbon de vivo, infanon ludanta kun serpento, Ubu-statuon, sunhorloĝon, elefanton, vidvinon riparanta fiŝreton, arbon plenplena je diversaj bestaj figuroj, malnovan domon de fiŝistoj.

Fine, la grupo atingis Palacon Piacentini, kie loĝis Beatrice Piacentini-Rinaldi, dialekta poetino, kiu havis la meriton doni al la lingvo de San Benedetto la dignon de literatura lingvo.

Hodiaŭ Palaco Piacentini estas deducita al la kulturo.

(raportis Jean Ripoche)

Dimanĉe **vespere Maria Grazia Barboni** ravis la kongresanojn per sia bela voĉo. Akompanante sin per gitaro, ŝi prezentis, en Esperanto, kanzonojn de Fabrizio De André, ankaŭ kun pecoj en la itala lingvo. Al tio aldoniĝis ankaŭ kelkaj kantoj en la franca kaj hispana.

Lunde matene okazis vizito de Marmuzeo. Raporto ne venis. Ĉu faros vi? ☺

Samtage de la 9-a ĝis la 12-a, dum **nepublika kunsido**, plej serioze diskutis la IFEF-komitatoj pri du kongres-proponoj prezentitaj al la nuna kongreso. Ili interalie temas pri la membro-nombro de landaj asocioj kaj pri konsisto de estraro. Sed diskutoj ankaŭ plivastiĝis al aliaj temoj, kiaj kotizoj, sendo-manieroj de la IFEF-bulteno, ktp.

Pri venontaj kongresoj oni parolis pri Ĉinio en 2015 (certe) kaj pri eblecoj en Bulgario (2016) kaj Kubo (2017).

Lunde posttagmeze okazis duontaga ekskurso, pri kiu ankoraŭ ne venis raporto via! ☺

Same pri la **lunda** vespera programero, "*Napolaj melodioj*" prezentitaj de grupo "*Malamusica*" (ĉeestis 90 kongresanoj).

Rimarkindaĵo: niaj ĉinaj kolegoj ofertas belan USB-memorilon (8 GB, 20 €) el porcelano! En ĝi troviĝas prezento pri la venont-kongresa regiono en Ĉinio, ktp. (NDLR: ni ricevis neniun kaŝmonon por tiel reklami!)

Anonceto: se vi partoprenos en la ĉi-jara UEA-kongreso en Bonaero, bonvolu kontaktiĝi kun Sylviane Lafargue.

Anonceto 2: eventualaj program-sanĝoj estos afiŝitaj en la akceptejo. Se ne, bonvolu turniĝi al Vito Tornillo ... LKK-prezidanto, kiu eble enuas! ☺

Kaj laste sed ne balaste, kiel anoncote komence de ĉi folio: **viajn** kontribuajn sennacianco atendas Laurent Vignaud kaj Jean Ripoche por redakti duan kongres-bulteneton. Redakto-fino estos merkrede vespere je 21h.



Kongres-bulteno n° 1 66-a IFEF-Kongreso San Benedetto del Tronto, 17-24ajn de majo 2014

Post Francio, kie vi lastjare kongresis malproksime de trajn-stacio, inter aŭtososeo kaj anten-mastego! Jen ĉi-jare preskaŭ paradizan kongreslokon vi atingis inter trajnstacio kaj maro, ĉe palmarboj kaj proksime al plaĝo. Ja el la kongresejo eblas vidi la maron kaj aŭdi la cirkulantajn trajnojn ... ankaŭ nokte!

Krome, por findecidi vin ne reveni hejmen sed anstataŭe resti en San Benedetto, la mangojn oni preparis por vi plej bongustaj kaj plensatigaj, ĉu ne? Eĉ tro, diris kelkaj! Sen paroli pri afableco de la gekelneroj!

La LKK tamen esperas, ke tiu ege bela ĉirkaŭaĵo ne malinstigos vin partopreni en la seriozaj kunsidoj!

Nu, ek al seriozaj linioj. Jen do por vi kelkaj (malmultaj kaj ne-literaturaj) linioj pri tio, kio jam okazis dum la kongreso. Ankaŭ **viam kontribuajn bonvenas**, jam pripensu kaj ekverku!

Lunde vespere (kiam redaktiĝas ĉi folio) ankoraŭ ne estis anoncita la oficiala nombro da **kongresanoj** sed la listo en la kongres-libro montras, ke al la nuna IFEF-kongreso venis Esperantistoj el 3 kontinentoj: Ameriko, Azio kaj Eŭropo!

Tiel vi povos renkonti kaj babili kun Esperantistoj el Ĉinio, Israelo kaj Kubo. El Afriko aliĝis 2 samideanoj, kiuj bedaŭrinde ne venis (interalie pro vizo-manko).

La **akceptado** de la alvenantaj kongresanoj ŝajne mirinde bonege funkciis

Ja ĉe la ĝiĉeto nekutime deĵoris nur unu homo, aŭ Vito, aŭ Gianfranco, sed la kongres-sakoj kaj fin-kalkuloj estis jam bonege pretigitaj: la raportanto aŭdis nenian plendon pri longa vico!

Gratulojn al la LKK!



Sabate antaŭtagmeze okazis oficiala akcepto de kongresanoj en la urbdomo.

Tie tiam ne ĉeestis ĵurnalisto, tamen, pro la reklamo farita de LKK en la 2 lastaj jaroj, pri la IFEF-kongreso raportis pluraj gazetoj en Interreto.

Krome, lunde raportis 2-foje televida regiona ĵurnalo, kaj plia elsendo estas planita marde matene je 7h 30.

Sabate je la 18h kiel kutime kune kunsidis LKK kaj IFEF-estraro por fin-aranĝi eventuale pendantajn malfacilaĵojn, sed Vito Tornillo, samtempe LKK-estro kaj IFEF-estraro kiu partoprenis en multaj IFEF-kongresoj, jam estis solvinta ĉiujn problemojn.

Sabate vespere okazis la tradicia interkona vespero kiu, por multaj kongresanoj, reale estis interreka vespero! Malsilento plene regis en la akceptejo kaj trinkejo. Tio tamen ne malhelpis niajn ĉinajn amikojn-kolegojn kunsidi kun IFEF-estraro por priparoli la venontjaran IFEF-kongreson en Ĉinio.

Dimanĉe **matene** la solenan inaŭguron partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj. Post salutvortoj de la LKK-estro Vito Tornillo, la kongresanaron salutis Fabio Urbinati, skabeno pri Produktado kaj Komerco, nome de la urbestro de San Benedetto del Tronto Giovanni Gaspari, Fausto Calabresi, prezidanto de la Provinca Komerca Konfederacio (kaj posedanto de la hotelo, en kiu okazas la kongreso), Luigi Renzi, sekretario de DLF San Benedetto del Tronto, Renato Corsetti, vic-prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, Barbara Pietrzak, reprezentantino de UEA (kaj ankaŭ nome de Esperanto-elsendo de Pola ret-radio) kaj Luigia Madella, reprezentantino de ILEI. La ĉeestantojn salutis ankaŭ verkistino el Ascoli, Lina Gabrielli, kiu kortuŝe parolis pri siaj Esperantistiĝo kaj vivo.

La kongreson salutis kaj bondeziris reprezentantoj de la ĉeestantaj landoj:

Aŭstrio: Martin Stuppniĝ	Kroatio: Zlatko Hinst
Belgio: Clara Bracke	Kubo: vortoj el Prezidanto Mario Sanchez de la Vega (legis Jindřich Tomišek)
Bulgario: Iskra Kopcheva	Nederlando: Gerry Schavemaker
Ĉeĥio: Ladislav Kovār	Pollando: Wieslaw Libner
Ĉinio: Han Zuwu	Rumanio: Ileana Cadar
Danio: Jan U. Niemann	Slovenio: mesaĝo el Jovan Mirkoviĉ (legis Jindřich Tomišek)
Francio: Christian Dardenne	Italio (gastiga lando): Honora Prezidanto Romano Bolognesi
Germanio: Achim Meinel	
Hispanio: Antonio de Diego	
Hungario: Istvan Sutka	
Israelo: Jehosua Tilleman	

Dum tiu inaŭguro diplomojn ricevis 3 personoj: Fausto Calabresi (prezidanto de la Provinca Komerca Konfederacio), Gianfranco Tomba kaj Elisa Gualandi (foto sur la dekstra paĝo). Komuna trajto de ili tri: ili multe subtenis kaj helpis en la organizado de la kongreso, ĉu rekte, ĉu nerekte, ĉu freŝe, ĉu jam dekojn da jaroj!

Finiĝis la inaŭguro per vortoj de IFEF-prezidantino Rodica Todor.

Tuj poste grup-fotiĝis antaŭ la kongresejo kaj sub forta suno la kongresanoj.

Dimanĉe **posttagmeze** je 14h samtempe okazis 3 programeroj:

- En la ĉefa salono, antaŭ **20 (*)** kongresanoj **prelegis Thierry Saladin** "*Kia ni rigardu tiun internacian peticion « Esperanto, oficiala lingvo de la Eŭropa Unio, nun!»*"
- En pli malgranda kunveno kunsidon de la **Faka Komisiono** gvidis Jan Niemann: ĉirkaŭ **20 (*)** laboremuloj diskutis pri la venontaj dumkongresaj fakprelegoj kaj ankaŭ pri elekto de taŭgaj difin-vortoj rilatantaj al fervoja tekniko.
- En kunven-ĉambro de hotelo Garden, bazan **Esperanto-kurson** gvidis Luigia Madella. Ĉar venis **5 (*)** personoj jam Esperantistoj, okazis enkonduko al la lingvo kaj amika konversacio.

(*) Resume, antaŭtagmeze la solenan inaŭguron partoprenis 100 personoj kaj komence de posttagmezo en 3 diversaj programeroj partoprenis sume 45 kongresanoj. $100 - 45 = 55$... kien do tiam malaperis 55 kongresanoj ... kiuj poste reaperis por vespermanĝo kaj muzika vespero ? Ĉu tro bela suno kulpas?



(dekstre, Elisa, kiu ricevis diplomon)

Post tiuj 3 sam-momentaj programeroj, **je 15h 30'** komenciĝis **vizito de la urbo San Benedetto del Tronto**.

Romano Bolognesi helpate de profesia ĉiceronino gvidis kongresanojn tra la kongresurbo.

Plurdekoj da personoj interesiĝis al la urba historio. Iaŭlonge de la pasado ili ricevis multajn informojn pri la diversaj statuoj dissemataj sur la vojo. Ĉiu montraĵo havas sian propran historion.

La pied-ekskursantoj vidis homon montranta sian korpan internon kaj aliajn, kiuj pre-